

en krepusk' profunde mi la kapon klinas
al vi
bonvole
pri vi mem zorgu por mia bono
kvankam asertas oni
ke ĉiaĵoj en la mond' finfine neniĝos

*ĉina unuo por mezuri distancon (=1/2 kilometro)

elĉinigis Lao San



Erarvagado

Bei Dao

laŭ fajfado de kolombo
mi vin serĉas
altaj arboj baras mian vidon al ĉielo
sur vojeto
leontod' erarvaganta
min kondukas al la blua-griza lago
en spegula bild' enakva flagretanta
mi vin trovas
la okulojn nesondeblajn

☺ Ĉina Fablo ☺

Avantaĝo

Ning Xi

Aŭdinte ke Anaso, Kokino kaj Bovo interparolas pri siaj propraj avantaĝoj, Rano paradaĉas fiere al ili kaj diras, "Hej, vi diras, ke vi havas viajn proprajn avantaĝojn — bone, kian avantaĝon vi havas, Anaso?"

"Naĝado."

"Ha, nemenciinde! Kaj vi, Kokino?"

"Demetado de ovoj."

"Demetado de ovoj? Estas ankaŭ ordinare.

Kaj vi, Bovo?"

"Terplugado."

"Ve, tiel vulgara. Ĉu vi ne povas fari ion elegantan?"

Tuj kiam li finas sian parolon, Rano vidas Ĉevalon prokisimiĝi kaj demandas al tiu, "Hola! Kian avantaĝon vi havas, Ĉevalo?"

"Tirado je ĉaro. Se eksplodos milito, ni portos surdorse la batalantojn al batalejo por mortigi malamikojn."

"Ba! Tio ankaŭ ne indas je mencio..."

Aŭdinte tion, Ĉevalo demandas al Rano, "Do kio estas via avantaĝo, D-ro Rano?"

"Komentado," diras Rano. "Mi komentas viajn avantaĝojn."



(el la ĉina: Dura)



EL «LAŬZI»

ĈAPITRO VII

Eterna estas la Ĉielo kaj eterna estas la Tero.

La kaŭzo, kial ili estas tiaj,

Kuŝas en tio, ke ili ne ekzistas por si mem,

Kaj pro tio ili povas daŭri por ĉiam.

Tial la Saĝulo metas sin en la lastan lokon,

Sed efektive Li ĉiam staras plej antaŭe.

Havante nenian konsideron pri si mem, Li bone sin konservas.

Ĉu ne ĝuste pro sia sinforĝeso

Li povas perfekte plenumi siajn privatajn celojn?

ĈAPITRO VIII

La supera bono estas kiel akvo.

La akvo nutras ĉiujn estaĵojn kaj ne konkuras kontraŭ ili.

Ĝi loĝas en lokoj, kiujn la homoj evitas,

Kaj tial ĝi estas plej proksima al la Taŭo.

Do preferu loĝejon modestan,

mi prelegis pri la urbo Duisburg kaj per grandaj bildoj mi klarigis produktojn-maŝinojn, kiuj estas faritaj de Mannesmann entrepreno. S-ro Xu Kangrong interpretis. S-ro prof. Wang Shen dankis pro mia prelego transdonante donacon al mi. Vespere ni bone estis regalita de la dommastrino de s-ro Xu Kangrong. Impresis min lia 10-jara filo kiu perfekte regis altrangan arton de kaligrafio. Do, mi havis multajn interparolojn. Estis vere neordinara interesa tago konatiĝi kun ĉarmaj homoj, kun altrangaj oficistoj, lerni pri fremdlanda kulturo, lace, sed plena de multaj travivaĵoj ni malfrue revenis al mia hejmea loĝejo.

Kaj ni estis en la hejmo de s-ro Wang. Ŝajnis al mi ke li estas riĉa. Okope ni per aŭto estis veturigita al luksa dancejo. Tie mi dancis kun ĉiuj virinoj de nia grupo. Kiel laste mi havis honoran dancon kun mia dommastrino s-ino Wan Difang, kaj mi lernis ludi "hazarda-ludon" kaj frato de Jariĉ preparis por mi kaj miaj familianoj belaspektan afiŝon kaligrafe skribita pro Novjaro. Mi ricevis unikan donacon — stampiloj de kaligraf-faranto kun la nomoj de Otto-Rita kaj niaj filoj Andreas kaj Christian Nitsche. La donacoj estas unika en la mondo, kaj farita el jado.

Ne eblis raportoj pri ĉiuj travivaĵoj havante en Wuhan. Je la 15-a Februaro venis tago de adiaŭo. Dankon al ĉiuj kiuj akompanis min dum promenoj, kiuj invitis min, do speciale mi dankas al Jariĉ, al lia ĉarma edzino kiu bonege regalis min. Estis mia plej interesa vojaĝo dum mia vivo, danke al Esperanto, lingvo de justeco kaj koreco. En la avidilejo ni kore kaj sincere adiaŭis unu la alian. En Beijing atendis min s-ro Lu Binsheng. Tie mi spertis pri Lanterna Festo. Alveninte hejme mi raportis al nia urbestro s-ro Josef Krings kaj al estro pri ĝemelurbaj rilatoj s-ro Holger Drasto pri mia vojaĝo transdonacante bondezirojn de Wuhan

registaro. Oni dankis per la vortoj: "Vi s-ro Nistche estis bonega reprezentanto de nia urbo. Dankon!"

Aldona Noto: Mia amiko Jariĉ estis aliĝinta al 84-a UK en Berli 1999. Ĉiuj necesaj dokumentoj estis pretaj. Do, informo pri kancero trafis min kiel glavo enirante koron. Jen vortoj el lasta letero veninta el Wuhan je la 12-a Junio 99 — Kara Otto... mi larmis leginte ke mi estas via plej intima amiko, laŭorde pli grava ol la propraj fratoj.

Je la 3-a de Septembro 1999 "Verda Stelo" bonanima, pacama, justeca paliĝas. Nia kara amiko Jariĉ restas ĉiam en bona rememoro. Dankon pro ĉio, kondolencon al la tuta familio Wan Difang. Al la familio restas multaj fotoj bone ordigita en albumo. La fotoj atestas "nian vivon" inter diverskulturaj familioj. Esperanto — riĉigas mian menson, mian pensmanieron kaj la ĉiutagan vivon. Ĝi estu lingvo de justeco kaj bonkoreco!



Eldonas Guangdong-a Esperanto-Asocio
Adreso: s-anino Harpina WU
Poŝtkesto 136, Jichang-xi,
Guangzhou, Ĉinio, CN-510403
E-poŝto: harpina@21cn.com
POŝT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!

.....

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou
Universitato, Guangdong515063, Ĉinio
Tel: (0754) 2903012 (hejme)
E-poŝto: wyd168@21cn.com
Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.
